**AGADRAPORTO DE JUNULARO ESPERANTISTA DE TANZANIA ORGANIZO (JETO) 2019-2020.**

## A: ENKONDUKO

La landa Junulara Organizo fondigxis en la jaro 2016, kiam okazis la 6a Afrika kongreso de Esperanto en la urbo Bunda Tanzanio celante disvastigi Esperanton en la tuta Tanzanio.
La organizo havas pli ol 30 aktivajn membrojn kiu agadas en siaj kluboj precipe cxirkaux lagzonoj.

JETO havas statuton kaj elektitajn estrarojn kiu gvidas la organizon aligxante cxe TEJO por fondi TEJO-n sekcion en Tanzanio.

## B: FARITAJ LABOROJ.

- Dum la jaro 2019-2020, JETO sukcese organizis kursojn cxe la urbego Mwanza, Muleba kaj Sirari. La kurso de Mwanza okazis dum 2 tagoj kun 4 partoprenintoj. Zainabu Samson la interesinto pri la e-lingvo organizis la kurson.
- En la Distrikto Sirari okazis 4 tagoj kurso kun 6 partoprenintoj. Cxiuj estis komencantoj, S-RO Devis Mitindo, kiu interesigxis pri la e-lingvo invitis la instruadon cxe lia Distrikto. Ambaux kursoj faritaj en Mwanza kaj Sirari estis por komencantoj.
- Cxe la distrikto Bunda, s-ro Paŭl K Kusaya kiel volontulo gvidis la kursojn. Verdire la agado en Bunda iras bone, cxar kelkaj junuloj en Bunda okupigxas pri instruado de la Esperanta lingvo per la la E-klubo nomata Bunda Esperantistaj Junularaj Organizo (BEJ).
- Aliflanke la tri taga kurso gvidita de Mulele Mbasa (ILEI prezidanto en Tanzanio) cxe Muleba Esperanto Klubo (MEK) fruktodonis, cxar finfine 10 lernatoj diplomigxis pri la baza kurso de Esperanto dum 2019 kunlabore kun John Magessa. MEK estis fondita de S-ro John E. Magessa, kiu estas la kunordiganto de la klubo. Li cxiam gvidas e-instruadon cxe la mezlernejo du foje semajne volonte. Fakte, Esperanto igxas la lingvo por multaj lernantoj cxe la mezlernejo Kaigara tra organizitaj ludoj kiel piedpilko, retpilko, kaj retpilkado kaj donaco de pokaloj al la venkintoj. Ludoj altigis la klubanojn gxis 60 en la klubo.
- Dum januaro kaj februaro antaux ol la pandemio, JETO okupigxis pri instruado de la lingvo kaj kandidatigxo por bonvenigi IJK-on en Tanzanio en la jaro 2021. Pro la fakto ke la pandemio preskaux finigxas en Tanzanio, cxiuj klubestroj denove dauxras la intruadon. Ankaux la estraroj de JETO dauxrigas la kandidatigxon

## C: LA CELO DE JETO.

1. Aligxi al TEJO kaj fondi la TEJO-on sekcion en Tanzanio.
2. Sukcesigi la junularon sxati kaj interesigxi pri lernado de Esperanta lingvo.
3. Plani projektojn, kiuj helpos sukcesigi la organizon fortigi la Movadon.
4. Okazigi kursojn kaj Seminariojn.

Subskribo de JETO,

| | |
|---|---|
| Paŭl K.Kusaya, | John E. Magessa |
| Sekretario. | Prezidanto |



Bunda Esperantista Junurala Organizo (BEJ)



***Kandidatoj montrante Esperanatajn Atestilojn cxe Muleba Esperanto Klubo (MEK)***




***Novaj elektitaj lernantaj gvidantoj kun siaj instruistoj.***



Ret'pilko venkintoj havante la kapron kiel donaco



Knabina  piedpilk'teamo havante sian kapron.



Knaboj piedpilk'ludantoj havante kapron kiel donaco pro la venko.




INSTRUADO CXE MULEBA ESPERANTO KLUBO (MEK)

